*El prelego prezentita en Gresillon*

# Evoluo de la skribo

De la unuaj skribaj signoj al nia skribmaniero kaj plej modernaj registradoj estis longa peniga vojo.

— La signoj malkovritaj en grotoj al kiuj oni atribuis religian aŭ ritan valoron, estis, eble, nur esprimo de kreema plezuro de stilizitaj bildoj sed eble, ankaŭ estis rimeno por teni memoron de okazaĵo ; rimeno de fundamenta esprimo de la homo per kiu efektiviĝas la projekcio de lia kompreno de la mondo, la aperigo de lia krea kapablo.

— Kiu estas la senco de la arbitraj signoj de la zonoj de la indianoj Iroquois faritaj per linioj de konkaĵoj aŭ perloj ?

— Multe oni parolis pri la surskriboj memorhelpaj de la Pask-insulo, similaj al figuroj de fadenludoj, kiuj subparolas psalmokantadon por rememori genealogiojn aŭ sanktajn himnojn ; surskriboj, kiuj unuavide similis al signoj de urboj apud la riverego Indus aŭ de Cejlono.

— Eĉ la manuskriptoj de la kopiistojmonaĥoj ludas kiel kolektiva memoro por inicitoj.

Skribo estas nur 6.000 jara.

Unue estis rakontoj per bildoj. La mallongigita skribo de la antikva Egiptujo, tiuj de Sankta Ĵeromo kaj Sankta Aŭgusteno taŭgis nur por pastroj kaj adeptoj.

Oni kredis skribon de dia deveno, kaj oni atribuas al Moseo la hebrean skribon.

Je la XVIIIa jarcento antaŭ Kristo, oni elpensis alfabetojn multformajn ĉe tre nombraj landoj.

La greka kaj ĉina lingvoj estas la plej malnovaj ; oni konas ilian evoluon de 1400 antaŭ Kristo ĝis nun t.e. 3350 jaroj proksimume kaj same evoluon de la skribo.

La skribmaniero de la plej malnovaj grekaj dokumentoj havas nenion komunan kun la alfabeto pruntita al Fenico je 750 a. Kristo. Estis fonetika skribo sed sufiĉe ne preciza. La unuaj dokumentoj estas kalkuloj sur argilaj tabuloj malkovritaj en 1886 en Kreto kaj en 1939 en Pylos (suda Grekujo). En 1952, oni malkovris la inventaron de potoj en reĝaj kuirejoj (1400a. Kristo).

La deĉifrado estis malfacila pro la evoluo de la lingvo ; sed finfine oni kapablis traduki tre antikvajn tekstojn.

De tiu alfabeto devenas la cirila alfabeto uzata de rusoj kaj slavoj kaj la latina alfabeto uzata en okcidenta Eŭropo, grandparte en Afriko kaj Azio. Oni celebris la XIan jarcenton (863) de la cirila alfabeto antaŭ 2 jaroj (1963). Konstanteno-Cirilo kaj Metodo estis fratoj el Tesaloniko, kiuj venis al Moravio por prediki evangelion per la lingvo de tiu lando. Cirilo elpensis literojn por skribi la slavan lingvon. Kiam ili mortis, iliaj disĉiploj forkuris Bulgarion, Makedonion.

Fine de la Xa jarcento, la kleraj Bulgaroj helenigis tiujn literojn, kiuj larĝe disvastiĝis en Serbion, Bosnion, Rusion en 998 kaj Rumanion ĝis la XIXa jarcento.

La malnova ĉina skribo estis ideografia (nenia indiko de prononco). La unuaj doku-

